

La Bulteneto

Nummer 66 - Jahr 2022  Numero 66 - Esperantojaro 136

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO

ZWEISPRACHIGES MAGAZIN AUS WIEN



LA PENTRISTA FAMILIO ALT EKSPozICIO EN ALBERTINA VIENO

ĝis la 29a de januaro 2023

La Bulteneto

Numero 66  Esperanto-jaro 136

Aliaj numeroj kiel pdf: bitoteko bulteneto

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfnergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio

Tekstoj: Renate kaj Walter Klag

esperanto@chello.at

Unverkäufliche, private Ausgabe - Nevendebla, privata eldono

Sur la titolpaĝo

Jakob Alt

Das Palais Herzog Alberts auf der Augustinerbastei, 1816.

La palaco de hercogo Albert sur Aŭgustina Bastiono en Vieno.

Feder in Schwarz, Aquarell.

Nigra plumo, akvarelo.

Albertina, Wien.

La verkoj de la artista familio Alt

estas majstraj artaĵoj de la aŭstria akvarela pentroarto. La unuan fojon Albertina montras elstarajn verkojn de Franz [franc] Alt por la Monda Ekspozicio 1873, kiuj montras la arkitekturan evoluon de Vieno.

La verkoj de la patro Jakob Alt fontas en la reordigo de Eŭropo post la Napoleonaj Militoj, do post 1814 kaj post la Viena Kongreso. Kun la filoj Rudolf kaj Franz – ambaŭ iĝis 92-jaraj – la familio Alt bildigas la kulturan evoluon de preskaŭ cent jaroj – de la Bidermajro ĝis la arto ĉirkaŭ 1900. La temoj estas arkitekturo, pejzaĝoj, la vivo en la urbo kaj la beleco de la naturo.

Al la artista familio apartenas Jakob Alt (1789–1872) kaj liaj du filoj Rudolf (1812–1905) kaj Franz (1821–1914). Jakob Alt venis 1810 de Frankfurto ĉe Majno al Vieno. Li vivtenis sian familion per la produktado de serioj de presitaj grafikaĵoj. Rudolf kaj Franz ellernis la akvarelan pentroarton de la patro. Tiel evoluis partnereca kunlaboro de la tri geniuloj.

La bildoj de ambaŭ filoj estas pentritaj virtuoze kaj esprimriĉe. Dum sia vivo Franz estis agnoskita de la socio, sed neniam atingis la maturecon de sia pli aĝa frato. Rudolf trovis ĉiam novajn solvojn kaj virtuozaĵojn sukcesojn en la akvarela pentroarto.

Rudolf nobeliĝis en la jaro 1897 kaj nomis sin ekde tiam Rudolf von [fon] Alt.

La ekspozicio estas videbla ĝis la 29an de januaro 2023 kaj montras proprajn objektojn de Albertina, kiuj montras la altan prestiĝon de la familio Alt en la arto de la 19a jarcento.



Franz Alt
Das Alte Kärntnertortheater, 1873.
La Malnova Teatro ĉe la Karintia Pordego de Vieno.
Aquarell.
Akvarelo.
Albertina, Wien



Rudolf von Alt
Der Dachstein im Salzkammergut vom Vorderen Gosausee, 1838.
La monto Dachstein [daĥŝtajn] kun la Antaŭa Gosau-Lago.
Aquarell, Glanzhöhungen, Lichte ausgekratzt.
Akvarelo, plifortigo de la brilado, brilpunktoj elgratigitaj.
Albertina, Wien



Rudolf von Alt
Das Anlauftal bei Gastein, 1893.
La Anlaŭf-Valo apud Gastein.
Aquarell, Deckfarben, Lichter ausgekratzt.
Akvarelo, kovrantaj farboj, brilpunktoj elgratigitaj.
Albertina, Wien



Rudolf von Alt
Blick in die Alservorstadt, 1872.
Rigardo al Alservorstadt, nun la naŭa distrikto de Vieno.
Aquarell, Deckfarben, Lichte ausgekratzt.
Akvarelo, kovrantaj farboj, brilpunktoj elgratigitaj.
Albertina, Wien



Rudolf von Alt
Interieur im Palais Harrach auf der Freyung in Wien, 1844.
Interioro de la Palaco Harrach [haraĥ] en la unua distrikto de Vieno.
Aquarell, Glanzhöhungen.
Akvarelo, plifortigo de la brilado.
Albertina, Wien



Jakob Alt

Blick aus dem Atelier des Künstlers gegen Dornbach, 1836

Rigardo el la ateliero de la artisto kontraŭ Dornbaĥ,

nun parto de la 17a distrikto de Vieno.

Bleistift, Aquarell. Kraĵono, akvarelo.

Albertina, Wien



Jakob Alt

Die Blaue Grotte auf der Insel Capri (Guckkastenblatt), um 1835/36

La Blua Groto sur la insulo Capri [kapri].

Folio por Rigardokesto.

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Rigardokesto>

Aquarell (Spuren einer Bleistiftvorzeichnung).

Akvarelo (spuretoj de antaŭa krajona desegnaĵo).

Albertina, Wien



Franz Alt
Die neue Hofoper in Wien, 1873.
La nova kortega operejo.
Aquarell.
Akvarelo.
Albertina, Wien

Bitte beachten Sie auch
die folgenden Seiten



Floro de frago fotita de Irene Klag 2020

LA MONO DE LA ESPERANTO-KOMUNUMO



Serio 1 + 5 + 10 Steloj, eldonita 1959, prezo de la serio 90 €.



50 Steloj Julia Isbrücker, eldonita 2020, prezo 60 €.



100 Steloj René de Saussure, eldonita 2018, prezo 50 €.

Sendokostoj 10 € por unu paketo. Validas por Eŭro-landoj.

Bonvole sendu vian mendon al esperanto@chello.at.

STELO-TABELO

Nominalo	Materialo	Maso	Dia- metro	Jaro	Eldon- kvanto
1 Stelo	Bronzo	3,4 g	20 mm	1959 ¹	5000
5 Steloj	Latuno	5,0 g	23 mm	1959 ¹	5000
10 Steloj	Cu – Ni	9,0 g	28 mm	1959 ¹	5000
25 Steloj	Cu-Ni 75-25	19 g	37 mm	1965	1000
25 Steloj	Ag 900/1000	25 g	37 mm	1965	5000
25 Steloj	Au 983/1000	50 g	37 mm	1965	10
1 Stelo	Plasto ruĝa	0,8 g	23 mm	2012	3000
3 Steloj	Plasto flava	0,9 g	25 mm	2012	3000
10 Steloj	Plasto verda	1,3 g	29 mm	2012	3000
100 Steloj	Ag 999/1000 ²	31,1 g 1 unco	37 mm	2018 ³	1000
50 Steloj	Ag 925/1000	30,0 g	40 mm	2020	300



Ag = arĝento, Au = oro, Cu = kupro, Ni = nikelo, g = gramo.

Produktado de la 100- kaj 50-stela monero-medaloj: Münze Österreich.

Produktado de la plastosteloj: Stekelbees, Belgio.

¹ Pregitaj en la jaro 1960

² La monero konsistas 999/1000 el Ag, pro la leĝa situacio en Aŭstrio la Ag-stampo estas 925.

³ Pregita en la jaro 2017

Esperanto-Numismatika Asocio

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la fakgrupo „Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo „Esperanta Numismatiko”, probable la ununura tia fakgrupo en la historio de Esperanto.

La instiga fakto estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian **terminaron**.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ok jaroj ĝis 155 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable por ni kaj vi estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas **SENPAGE** aliĝi (sufiĉas respondi: „Mi konsentas aliĝi”). Krome la **NUR PERRETA** revuo estas tute **SENKOSTA**! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, vi tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn, 4 numerojn jare.

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en la Jarlibro de UEA. Se vi deziras kromajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: bert.boon@skynet.be

Vi rajtas unue peti provnumeron! Vi decidus poste!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de „Esperanta Numismatiko”



Esperanto-Bibliothek und Ausstellungsräume

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3

☎ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h

Esperantokurse und Führungen auf Anfrage

Im selben Haus befinden sich auch die

Musikaliensammlung

und das

Globenmuseum